

LEA/G

85 jaroj Laborista Esperanto-Asocio
40 jaroj LEA/G - 4 jaroj MAGAZINO

N-ro 16 4/96

JUBILEA ELDONO!

MAGAZINO

Organo de Libera Esperanto-Asocio / Germanio (LEA/G)
Membro de LEA-Komitato de S.A.T. Paris
Organ des Freien Esperanto - Bundes in Deutschland

Ĉu 40 jaroj devigas jubileon?

Paskon 1996: LEA/G aĝis kvardek jarojn. Oni festas reale jubileon post 25, 50 aŭ pli da jaroj. Sed LEA/G-anoj el la jaro 1956 pli kaj pli devis forlasi nian asocion, ĉu pro malsano, ĉu pro morto. Mi timas, ke post pluaj dek jaroj neniu de la pli junaj LEA/G-anoj emas kaj eble ne povas verki historion pro manko de dokumentoj.

Nu, jes, Dank' al Fritz-Hüser-Institut por germanlingva kaj eksterlanda laborista literaturo, Dortmund, dokumenta materialo ensendita de maljunaj LEA/G-membroj estas arkivata. Ĝi estas tiel ampleksa, ke mi povus skribi libron.

Mi skribis historion, ĉu per rememoroj, ĉu per materialo el la menciita instituto, sed nur kadre de tiu ĉi eldono de MAGAZINO. Helpis min Hans Rodewig, Walter Poppeck, Friedel Bues, Jiri Proskovec, Karl-Helz Kersting, Lothar Nußbaum k.a. per artikoloj kaj materialo. Al ili mian amikan dankon! Ĉu mi povas esperi, ke en la jaro 2006 espereble lu eldonos priskribojn el la tiam lastaj dek jaroj?

La historio pri 40 jaroj da ekzisto de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj restos konservata en la Fritz-Hüser-Institut, por ke la posteularo povos rememori al aktivuloj el 1956 kaj sekvintaj jaroj. Iliaj neprofitemaj malegoismaj aktivecoj por la ideo de Esperanto estu vojmontraj por la nuntempaj esperantistoj, ne malpliigi la klopodon konatigi la Internacian Lingvon Esperanto al la homoj en la tuta mondo.

FARU AMIKECON PER ESPERANTO NE MORTON PER MILITO!

Albert Stephan



LINGVA ASOCIO FONDIĜAS

Jam en MAGAZINO, eldono n°15 (3.1996) ni informis (en Esperanto kaj germana lingvo) la legantojn pri la fondiĝo de nia asocio. Jen kompletigo, kiun Reinhard Uhde, Bremen, siatempe redaktoro de la LEA/G-organo LA LIBERA ESPERANTISTO (nuntampe MAGAZINO), skribis en eldono n°38 (Junio 1959) en germana lingvo - ni tradukas:

"Kiam je pasko 1956 dum la fond-kongreso de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj en Frankfurt/Main(rivero) la partoprenantoj diskutis la statuton, regis la 'ruĝa kraĵono'. Oni opiniis, ke estus necesa simple limigi sin je la vero kaj doni al la juna organizo nur kelkajn bazajn subtenilojn. Kadre de la kunveno 1957 en Rotterdam Hermann Wagner estis komisiita de la kunvenantaro, ellabori novan kompletan statuton, kiu precipe akcentu la publikan utilon kaj evitu, ke ne klara kaj ne komplete statuto estus kaŭzo por malharmonio, kiel okazis jam unufoje.

La projekto de Wagner estas surmana. Ĝiaj dek kvin paragrafoj estos publikigataj sur la venontaj paĝoj de ĉi tiu eldono de nia asocia organo. Pri ĉi tiu statuto decidos la asocia kunveno 1959 en Dortmund.

Ĉar verŝajne antaŭ kaj dum la asocia kunveno preskaŭ ne estos sufiĉa tempo por necesa konsilo kaj diskuto, estas rekomendinda la sekvonta propono al la asocia kunveno:

"La asocia kunveno decidu:...

- a) La Wagner-projekto pri LEA/G-statuto, publikigata en la juna eldono de LA LIBERA ESPERANTISTO estos objekto por la diskuto;
- b) ĝis 10-a de Januaro 1960 estas eble sendi al la asocia prezidantaro aliig-proponojn por la PROVIZORA STATUTO;
- c) la asocia prezidantaro kontrolas kune kun k-do Wagner la aliig-proponojn, formulas novan koncepton kaj akordigas ĝin kun la membroj de asocia komisiono;
- d) ĉi tiu koncepto estos prezentata al la unuopaj membroj per enketado;
- e) deflankiĝantaj opinioj de membroj de la asocia komisiono povas esti formulataj kiel aliig-proponoj kaj samtempe prezentataj per enketado;
- f) simpla plimulto de tiuj, kiuj partoprenas je voĉdono decidas."

(Trad. Stephan/Rodewig)

Jen la originala germanlingva teksto:

Reinhard Uhde, Bremen, seinerzeit Redakteur von LA LIBERA ESPERANTISTO, des Bundesorgans, das heute MAGAZINO heißt, schrieb in der Ausgabe Nr. 38 vom Juni 1959:

"Als Ostern 1956 auf der Frankfurter Gründungsversammlung des Freien Esperanto-Bundes für deutsche Sprachgebiete die Satzungen beraten wurden, da regierte der Rotstift. Es kam darauf an, sich in aller Bescheidenheit auf das Allernotwendigste zu beschränken und der jungen Organisation nur einige Grundstützen zu geben.

Anlässlich der Rotterdamer Tagung 1957 wurde dann das FEB-Vorstandsmitglied Hermann Wagner mit der Ausarbeitung einer neuen, umfassenden Satzung beauftragt, die insbesondere die Gemeinnützigkeit des Bundes herausstreichen und vermeiden sollte, daß irgendwann einmal unklare, halb fertige Satzungen die Quelle eines Unfriedens werden könnten, wie dies an anderer Stelle einmal der Fall war.

Der Wagner-Entwurf liegt jetzt vor. Seine fünfzehn Paragraphen werden auf den nächsten Seiten dieser Ausgabe unseres Bundesorgans veröffentlicht und stehen auf der Bundesversammlung 1959 in Dortmund zur Beschlußfassung an.

Da aber vor und in der Bundesversammlung kaum ausreichend Gelegenheit zur notwendigen Beratung und Diskussion sein durfte, empfiehlt sich der folgende Antrag an die Bundesversammlung:

"Die Bundesversammlung wolle beschließen

- a) Der Wagner-Entwurf der FEB-Satzung, veröffentlicht in der Juni-Ausgabe von LA LIBERA ESPERANTISTO, wird zur Diskussion gestellt.
- b) Bis zum 10. Januar 1960 können Änderungsvorschläge zur dieser VORLÄUFIGEN SATZUNG an die Bundesleitung gerichtet werden.
- c) Die Bundesleitung prüft in Zusammenarbeit mit k-do Wagner die Änderungsvorschläge, formuliert einen neuen Entwurf und stimmt ihn mit den Mitgliedern des Bundes-Ausschusses ab
- d) Dieser Entwurf wird den Einzelmitgliedern zur Urabstimmung gestellt.
- e) Abweichende Meinungen von Mitgliedern des Bundesausschusses können zu Änderungsanträgen formuliert werden und gleichzeitig zur Urabstimmung gestellt werden.
- f) Bei der Abstimmung entscheidet die einfache Mehrheit der an der Abstimmung Teilnehmenden."

Elekto de la asocia estraro

La voĉdonrajtoj de la asocia kunveno 1957 en Rotterdam elektis:

Hans Pillekamp, Düsseldorf - 1-a prezidanto

Alfred von der Heid, Bielefeld - 2-a prezidanto

Grete Jäkel, Frankfurt/M - 1-a kasisto

Franz Rabi, Frankfurt/M - 2-a kasisto

Reinhard Uhde, Bremen - sekretario k. redaktanto

Friedel Bues, Hannover - redaktanto

(de LA LIBERA ESPERANTISTO)

Erich Schmidt, Dortmund - eldonanto de l'asocia organo

Hermann Wagner, Esslingen - referanto de l'NATURAMIKOJ

Gerhard Kunze, Berlin - referanto por la sovieta okupita zono

La asocia kaso estis kontrolita nome de **Leonhard Puff** kaj **Daniel Jäger** ambaŭ el Frankfurt/Main.

Dum la jaroj estraranoj estis anstataŭitaj ĉu pro morto ĉu el aliaj kaŭzoj. Laŭkaze transprenis funkciojn: **Heinrich Bellen**, Dortmund, **Manfred Führer**, Eschborn, **Eduard Weichmann**, Dortmund, kaj aliaj. Pri la kaso de LEA/G gardis i.a. **Margot Weichmann** kaj **Herta Bellen**, ambaŭ Dortmund. Nuntempe majstris **Karl-Heinz Kersting**, Essen, la problemojn de la asociaj financoj.

Cetere: La asocia kunveno 1959 okazis la 5-an de Aŭgusto ek de 14.15 h en la Fritz-Henßler-Domo en Dortmund kadre de la mondkongreso de S.A.T. Invitis la unua asocia prezidanto Hans Pillekamp, Düsseldorf. Li skribis i.a. en la supre menciita eldono de la asocia organo:

... Mi estas certa, ke multaj LEA/G-membroj uzos la ebleson, kuniksi la sortajn de nia asocio kaj samtempe plifortigi kontaktojn al multaj geamikoj en la tuta mondo, kiuj uzos la mandan kunvenon en Dortmund por demonstracii supermancian interkomprenon.

La S.A.T.-kongreso en Dortmund partoprenis 425 S.A.T.-membroj. Inter ili la partoprenantoj de la LEA/G-kunveno.



Hans Pillekamp 1979 en Svanvik, kie li partoprenis la SAT-kongreson

KION OKAZIS EN DÜSSELDORF?

Kiam mi fine de 1947 revenis el militkaptiteco en Egiptio, kie mi hazarde lernis la lingvon Esperanto, mi ŝatis tuj havi kontaktojn kun esperantistoj en mia hejm-urbo Düsseldorf. Ekzistis societo al kiu mi membriĝis. La prezidanto estis Hans Pillekamp. La membraro venis el ĉiuj tavoloj de l' enloĝantoj de la urbo. Inter ili socialdemokratoj, kristanoj, komunistoj, liberal-uloj kaj ĉiu profesio. Ni relative kontente interkomprenis nin, nur la diversaj viv-opinioj iomete limigis pli bonan kontakton. Inter aliaj mi ŝatis bonan esperantiston en la rondo, la kasiston Ackermann.

Hans Pillekamp estis mia mentoro kaj verŝajne jam en tiu tempo li priprensis, ke mi iam estu lia anstataŭanto. Li ofte demandis min pri iu helpo. Hans parolis Esperanton senerare kaj majstris ekzemplodone la gramatikon.

Hans varbis min por S.A.T. Mi akcentu, ke mi ĝis nuntempo neniam bedaŭris mian paŝon al ĉi tiu monda organizo, kie mi trovis veraj amikoj. Ĉiu kongreso, kiun mi partoprenis ĝis nun, prezentis familian etoson. Multjare mi aktivis kiel S.A.T.-peranto en Germanio.

La S.A.T.-esperantistoj rimarkis post ioma tempo, ke burĝaj membroj rifuzis kontaktojn kun laboristaj esperantistoj, tamen inter ili kelkaj toleris alian viv-opinion t.a Horst Springer+, sama aĝogrupa kiel mi, kiu ĉiam restis fidela amiko. Krom tio, okazaĵo pri kiu mi jam skribis en MAGAZINO n° 15, paĝo 2, ĉagrenis Hans Pillekamp kaj nin aliaj S.A.T.-membroj.

Hans aranĝis kunvenon de la laboristaj esperantistoj (en senkosta ĉambro de sindikata domo) kaj rekomendis fondon de propra asocio. LIBERA ESPERANTO-ASOCIO por germanlingvaj regionoj estis fine realeco. Ne nur en Düsseldorf aliĝis esperantistoj kiel ekz. Georg Bana, B.Schepers, Ludwig Thies, kiu poste gvidis la LEA/G-grupon en Düsseldorf kaj ties filo Carl-Ludwig ankoraŭ estas fidela membro de LEA/G kaj S.A.T., Franz Bergmann, Johanna Schwarz, Franz Bajorat, Friedrich Herbst kaj mi mem, sed ankaŭ el aliaj urboj kaj lokoj ekz. Helene Killmer+, el Wuppertal kaj la filino Helga, kiu edziĝis Alfred Conzeth, Mettmann, Josef Zwolenski, Recklinghausen, Josef Burger, la poeto el Essen, Hans Werner Knötzsch kaj edzino+, Hagen, Hermann Scheffler, Oberhausen. Multe pli mi povis nomi, sed mankas la spaco.

La aktivecoj de laboristaj esperantistoj mi tiel ŝatis, ke mi ne hezitis aktive kunlabori. Jam kelkaj jaroj mi klopodas kontentige okupi la funkcion: 1-a prezidanto de LEA/G. Helpas min mia edzino Margot, esperantistino jam delonge.

Nuntempe ekzistas en Düsseldorf eta LEA/G-grupo, kies 'estro' Hans Meyer zorgas, ke Bruno Görke, Franz Lenze, Detlev Suck, Carl-Ludwig Thies kaj Friedrich Herbst restu fidelaj membroj.

Albert Stephan



(de maldekstre: A. Stephan, ino Heidenreich, Johanna Schwarz, Hans Pillekamp, Franz Bajorat kaj Wilhelm Ackermann)



Ludwig Thies

PRI LA REFONDO KAJ SORTO DE LA LABORISTA ESPERANTO-ASOCIO EN HANOVRO POST 1945

Estis sem Julio 1945, kiam mi - 16-jaraĝa - revenis kiel malsatanta militkaptito al mia hejmurbo Hanovro. La manko de nutraĵoj kaj de aliaj hodiaŭ memkompreneblaj agrablaĵoj estis probleme, sed multe pli okupis min la arda beziro al lernado de la lingvo Esperanto. Jam dum la milito mi trovis lernolibron de Fritz Hegewald en la libroŝranko de mia patro. La aŭtoro estis dum la dudekaj jaroj prezidanto de la Laborista Esperanto-Asocio de Hanovro. Tio estis mia unua kontakto kun la lingvo, kiun la nazioj malpermesis.

Baldaŭ mi renkontis samaĝajn kaj pli aĝajn adeptojn de la lingvo, kiuj volis lerni kaj (denove) praktiki Esperanton. Amiko de mia patro, Karl Bues (patro de Friedel Bues), trovis inter siaj 'savitaj' paperaĵoj el da tempo de antaŭ 1933 la statuton de la nomita LABORISTA ESPERANTO-ASOCIO de Hanovro. Per ĝi li, kune kun aliaj esperantistoj, povis konvinki la tiaman Britan Militistan Registaron pri la sendanĝera karaktero de la asocio. Tiel komenciĝis la aktivecoj por Esperanto en nia urbo.

Kun simpatio mi memorigas al siatempaj aktivuloj de la unuaj jaroj precipe Paul Schalmey, kiu servis en la 'Internacia Brigado' kadre de la respublikana armeo de Hispanio dum la civila milito de 1936 ĝis 1939. Li estis internigita en Nord-Afriko flanke de la francaj (Pétain)-aŭtoritatoj kaj restis post-liberiĝo dum kelkaj monatoj en Svislando kaj Britio por fine reveni al Germanio. Ankaŭ Karl Hünold restas en mia memoro kiel indulga instruanto de Esperanto, August Herbst, kiu zorgis por eldono de la gazeto 'Komunikoj', Max Walter, plizaĝa amiko de miaj gepatroj kaj, iom poste, Wilhelm Marienfeld kaj Alfred Weise.

La Laborista Esperanto-Asocio konvinkis ankaŭ ne-laboristojn partopreni en la laboro por Esperanto. En la jaro 1948 kvincent (500) aŭ pli da membroj apartenis al la hanovra asocio. Pro la monreformo en Junio 1948 en la okcidentaj zonoj multaj simpatiantoj forlasis la organizaĵon.

La restintaj provis daŭrigi, sed - pro ŝanĝo en la gvidantaj personoj - la laborista karaktero de la asocio aliĝis kaj la nomo de l'asocio estis transformita al 'Esperanto-Societo Hannover' (laŭ mia memoro). Tio kompreneble ne plaĉis al la laboristtendencaj esperantistoj kaj ili plejparte ekis aŭ ne plu aktivis. Dum la sekvontaj jaroj tiuj lastaj - jam delonge membroj de S.A.T. - kunvenis kiel 'S.A.T.-rondo' aparte kaj pli kaj pli perdis la kontakton al la aliaj, 'burĝaj' esperantistoj en Hanovro. Post fonda de la LIBERA ESPERANTO-ASOCIO por Germanlingvio en 1956 ĉi tiu grupo aniĝis al tiu nova organizo.

Starante: August Klemm, Hans Rodewig,
Friedel Bues.
Sidante: Wilhelm Marienfeld, Fritz Grosse,
Max Walter, Hans Strüver.



Dum la forpasado de la tempo ambaŭ la Esperanto-grupoj en Hanovro perdis preskaŭ sian tutan anaron ĉu pro mortoj ĉu pro ekŝiĝoj. Fine dum la sepdekaj jaroj ne plu ekzistis kluba aŭ asocia vivo iaspeca. Tamen, en la jaro 1980, pro iniciato de studentoj de la Universitato Hanovro, kiuj interesiĝis por Esperanto, kaj klopodoj de aktivuloj proksimume 25 ĝeesperantistoj rekunvenis.

Oni komence intencis fandi novan, oficialan Esperanto-uniĝon en jure konvena formo. Sed, bedaŭrinde, tiu plano ne efektiviĝis. Pro tio kelkaj el la iamaj partoprenintoj konkludis, regule kunveni, sed kvazaŭ 'private'. Tio okazas nun unufoje monate en luita salono de urba konstruaĵo por kulturaj aranĝoj. La partoprenantoj diversspecaj sociaj medioj i.a. instruistoj, studentoj, pensiuloj, laboristoj, tolereme interdiskutas, raportas pri okazaĵoj el la Esperanto-mondo aŭ priparolas lingvajn demandojn.

En tiu kadro ankaŭ la ideo de la laborista Esperanto-movado restas unu de la temoj, kiuj trovas eĥon en la nuna ESPERANTO-GRUPO HANOVRO, al kiu apartenas kvar LEAG-anoj.

Hans Rodewig

NAJLO - KUNVENO LEAG - specialaĵo

Ĉu estas kunveno kie oni laboras per najloj kaj martelo? En certa senco, jes! 1953 dum la rendevuo de S.A.T.-anoj en Ruhr-regiono oni intencis pendigli afiŝon sur la muron de la kunvenejo. Mankis pendigilo. Iu el la rondo kunportis hazarde grandan najlon por montri al la geamikoj, kiajn grandajn najlojn ili 'fabrikas' en la laborejoj. Kompreneble, ke tiu najlo ne taŭgis, la afiŝo ne trovis lokon sur la muro.

La najlo inspiris lun partoprenanton proponi, ke la estontaj kunvenoj havu la nomon 'Najlo-Kunveno'. Pri kunveno je 11-an de majo 1969 en Hagen jen listo de la partoprenantoj. Ĉeestis pli ol 35 gekamaradoj. Nombro pri kiu hodiaŭa organizanto de Najlo-Kunveno nur povas revi. La lastan 1992 en Düsseldorf partoprenis nur 12 esperantistoj.

La 'najlo' kuŝas en eta ligna kesto ĉe k-do Stephan, kiu intencas deponi ĝin ĉe la Fritz-Hüser-Institut en Dortmund. Eble li trovos antaŭ ŝancon montri ĝin al kunvenaro de LEAG.

AFS

Lothar Nussbaum el Kolonjo rakontas:

"Mi lernis Esperanton en la jaro 1947 en mia hejmurbo Kiel kaj estis aktiva en ties Esperanto-grupo. 1949 mi fondis junulargrupon, kiu estis akceptita de la Jugendring Kiel. En la jaro dum la tn. 'Kieler Woche' okazis tutjunulara tendaro kaj mi sukcesis, ke Esperanto estis unu el la oficialaj lingvoj. En la unuaj jaroj post la dua milito mi povis partopreni Esperanto-kongresojn. Post 1949 tio ne plu eblis, ĉar mi ne havis sufiĉe da mono, ĉar senlaborulo.

S.A.T. interesis min kaj mi aniĝis, kiam mi opiniis, taŭge paroli nian lingvon. Bedaŭrinde mi devis ĉesi la membrecon jam en la jaro 1953 pro certaj kaŭzoj, kiujn mi hodiaŭ ne plu konas, verŝajne pro monmanko. Mi memoras al la SAT-kongreso 1952 en Düsseldorf, kie mi kontaktis kun Maria Weber el Kolonjo. En proksima urbeto de Düsseldorf, en Junulargastejo Ratingen, okazis siatempe SAT-junularrenkontiĝo, kiun mi kunorganizis.

K-dino Weber intencis dumtempe organizi Junular-Respublikon Esperanto, sed tio ne funkciis pro kaŭzoj kiuj hodiaŭ mi ne plu konas. Mi havas ankoraŭ partopren-karton (n°1) subskribita de Maria.

Ankaŭ bone mi memoras al la ŝipveturado de Düsseldorf al Königswinter. Oni petis min doni klarigojn pri la kolonja katedralo per mikrofono. Oni primiris miajn detalajn konojn. Ili ne rimarkis, ke mi havis ĉemane poŝtkarton sur kiu estis ĉiuj detaloj.

Iam en 1965 mi aŭdis pri LEAG kaj aliĝis. Sed por esti sincera, miaj solaj aktivecoj estis kaj estas pli aŭ malpli vigle korespondi kaj montri grandan glumarkon ESPERANTO sur mia aŭtomobilo. En mia firmao la ĉefo tute ne ŝatis, ke mi prezentis la lingvon."

Cetero, kara kamarado, Albert Stephan helpis 1952 organizi la SAT-kongreson kaj junularrenkontiĝon. Li memoras ankaŭ al la aktivecoj de Maria Weber. Ŝi estis afabla esperantistino.



Dezembro 1996
Zamenhof-Memor-kaj Esperanto-
Librotago



Tajlo. Rimun 11.3.89
in Zagreb

- 1. ...
- 2. H. Berger 4020 Matteman, Kappelstr. 22
- 3. H. Lenzel
- 4. ...
- 5. B. Schepers ... 49
- 6. ...
- 7. ...
- 8. ...
- 9. ...
- 10. Hart Keller ...
- 11. Will. Baglerdt 4018 Langenfeld Kappelstr. 11
- 12. ...
- 13. Frick. Wickel ...
- 14. Bürger Josef Essen, Kappelstr. 9
- 15. Bernh. Meimert Bielefeld, Ling. Lg. Kamp 64.8
- 16. ...
- 17. H. Schickelthor ...
- 18. ...
- 19. ...
- 20. ...
- 21. ...
- 22. ...
- 23. ...
- 24. ...
- 25. Franz Gerboth 46) Do-Kruskel, Stadtst. 4
- 26. ...
- 27. ...
- 28. Margot Weichmann 46) - Kirchd. Lotenkamp
- 29. Edward Weichmann
- 30. ...
- 31. ...
- 32. ...
- 33. ...
- 34. ...
- 35. ...

Esperanto

Edzperanto

Mi laboris tiam kiel raportisto por la granda matena gazeto „Daily Sensation“. Ĉiutage mi ĉasis diversajn interesajn strangaĵojn, kiujn la legantoj ŝatis mangadi kiel deserton ĉe sia matenmanĝo. Ilia apetito kreskis konstante, kaj la redakcio postulis de mi ĉiam pli interesan materialon. Sed okazis foje, ke mia flarsenta nazo elsnufis unikajn kuriozaĵojn, kiun — tio estas plej stranga! — mi ne povis surtabligi al miaj legantoj. Mi devis prisilenti ĝin, por unuflanke ne malutili al nia Esperanto kaj aliflanke ne kompromiti entreprenon bonege poresperantan. Temas pri la edzperanta oficejo „Svat“ de Mr. Pintox. Al vi, karaj samideanoj, mi riskas rakonti pri mia vizito ĉe Mr. Pintox kaj esperas, ke vi konservos ĉion kiel pure „esperantistan sekreton“ kaj ne disfamigos tiun intiman aferon tra la tuta mondo.

La orlittera ŝildo „SVAT“, kiun mi trovis inter multaj aliaj firma-ŝildoj, informis ke la oficejo troviĝas sur la 25-a etaĝo de tiu moderna dormejo. La liftisto (ĉi-foje ne knabo sed maljunulo) kapklinis al mi kun bonvolema diskreta rideto, kiam mi indikis la celon de mia veturo. Evidente li vidis en mi kandidaton, kiu urĝe bezonas edzinon, kaj fulmrapide ekspedis min en la 25-an etagon.

„Dekstre, la dua koridoro,“ li informis kaj aldonis adiaŭe: „Bonŝancon, sinjoro!“

Mia intenco kompreneble ne estis serĉado de vivkunulino, sed mia tasko estis delikata esplorado de la metodoj, laŭ kiuj laboris tiu svata entrepreno, kiu tute ne anoncis sin publike en la gazetaro kaj malgraŭ tio lastatempe akiris famon de homfeliĉiga instituto.

Beleta sekretariino kun ĉarma rideto de zorgema patrino akceptis min kaj malfermis la pordon al la Svat-paradizo. La ĉefanĝelo de tiu paradizo, Mr. Charles Pintox, sidis en sia oficejo malantaŭ grandega skribtablo, sur kiu staris kelkaj telefonoj. La ĉambro estis elegante meblita per molaj klubfoteloj kaj impresis min antaŭ ĉio per siaj muroj kovritaj per centoj de pli-malpli grandaj foto-bildoj. Sur ĉiu el tiuj

bildoj montriĝis paro de novbakitaj geedzoj (evidente feliĉaj ĉar ridetantaj!) ofte ĉirkaŭitaj de multnombraj familiaj kaj parencoj.

Mr. Pintox tuj eksaltis de sia alta seĝo kaj ĉirkaŭkuris kun etaj rapidaj paŝoj la skribtablon por premi mian manon: „Bonvenon, kara sinjoro! La entrepreno Svat salutas vin plej kore kaj estas de nun via humila servanto! Sidigu, jes, komforte. Bonvolu: cigaredon aŭ... aŭ glaseton da vino, he?“

Mi devas konfesi, ke la figuro de sinjoro Pintox estis tiel komika, ke mi ne povis kaŝi rideton. Ĝi memorigis min pri infana ludfiguro 'nenam-renversulo' kun plumba rondaĵo anstataŭanta piedojn. Ĉio estis rondforma: la kapo, la ventro, la nazo, sur kiu sidis rondaj okulvitroj, tra kiuj rigardis viglaj, rondaj okuletoj. Ankaŭ liaj gestoj estis ronde-svingaj, kiam li proponis arĝentan cigaredujon, kiam liaj rondaj fingroj, similaj al rozkoloraj kolbasetoj, elpoŝigis fajrigilon por ekbruligi cigaredon.

Tion farante li ĉirkaŭiradis min, liaj esplor-emaj okuletoj taksis min de ĉiuj flankoj, li ŝultrofrapis min amike kaj babilis senĉese: „Aspekto bonega, figuro eleganta, vizaĝo inteligenta..... akceptu miajn gratulojn, vi placas al mi, kara sinjoro —.“

„Mi tre dankas pro viaj flataj komplimentoj, sed... sed...“ mi volis plej rapide klarigi al li, ke mi ne venis kiel kliento. Nervoze mi ekŝovetis miajn okulvitrojn.

Sed tiun mian geston li miskomprenis kaj interrompis min ridante: „Aaa — mi komprenas, vi timas, ke la okulvitroj estas malhelpaĵo? Haha, mia kara, tro malmulte vi konas la virinan animon.“

ktp. ktp.

Ni legis la ĉi-antaŭajn liniojn en la libro „La Verda Raketo“ de Jean Forge (1903 — 1980). Se la rakonto plaĉis al vi, ni rekomendas la libron.

Cetera, laŭ ondiro, ankoraŭ hodiaŭ ekzistu similan entreprenon. Ĉu iu de niaj legantoj scias la adreson? Skribu al la redakcio.

LA KONKURSO

En jubilea eldono n°15 de MAGAZINO ni ebligis al la ŝtata legantaro gajni libron skribita en lingvo internacia. La partopreno estis "superfortinta" (!); NUR nia legantino Karin Lencki ensendis la respondojn al la kvin demandoj, kompreneble ĉiu estis korekta! Ŝi gajnis la libron **RESONOJ** (de Weinzierl). Karin, gratulon kaj amikan dankon ĉar vi ne jetis LEA/G-gazeton en iun angulon, sed legis ĝin de la komenco ĝis la lasta paĝo, kie vi trovis la konkurson.

Karaj legantoj, ankaŭ tiuj en eksterlando, vi povas ankoraŭ partopreni la konkurson (tio ne estas la ekskurso!) ĝis fino de novembro ĉijare.

La redakcio

IMPRESOJ DE LA UK-o EN PRAGO

Kritiko de juna esperantisto.

Ĉi-jare okazis la UEA-kongreso en 'ora' Prago; denove post longega 75 jaroj. La unua kongreso en la ĉeĥa metropolo 1921 famiĝis pro la fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). La malfavora tempo post la dua mondmilito ne permesis aranĝi mondan kongreson jam pli frue malgraŭ ke la ĉeĥoslovakaj esperantistoj ege aktivis. Nur post la reforma vento el Sovetio fine de la okdekaj jaroj oni riskis plani tian kongreson por la jaro 1991. Bedaŭrinde subitaj politik-ekonomiaj ŝanĝoj malebligis la finan aranĝon de la kongreso.

Jam antaŭ la kongreso mi jam surprize konstatis, ke postkongresaj ekskursoj ne estas organizitaj - mi nenie legis pri ili. Ankaŭ loĝiga servo de UEA jam surprizis min. La plej malmultekosta tranoktado kostis 35 nederlandajn Guldenojn - tro multekosta por partoprenantoj el orientaj landoj. Fakte estis organizita ankaŭ malmultekosta amaslodgejo, sed nur por junuloj.

Tamen, en Prago eblas tranokti tre malmultekoste en studentaj hejmoj, ĉar la ĉambroj estas liberaj dum somera ferio. Mia opinio LKK fuŝe ne ofertis tiujn tranokteblecojn.

Ĉar mi skribas kritikon, mi ne povas prisilenti - bedaŭrinde - la liston de fuŝoj kaj fuŝetoj okazitaj en la kongreso. Okulfrapē mankis videbla reklamo pri la kongreso antaŭ kaj en la kongresejo. Krōm la verda flago kaj tabuleto nenie aperis sciigoj pri la

kongreso. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) mi ankaŭ la 'Nacia vespero'. Dum la tuta vespero prezentis sin unusola folkloro grupo el orienta Moravio. Ili ludis tipan moravian muzikon. Ĉar la granda parto de la eksterlandaj partoprenantoj ne komprenis tiun diferencon inter ĉeĥa popolmuziko, ili certe opiniis, ke ĵus ĉi tiu muziko estas la tipa ĉeĥa. Mankis entute aliaj eroj el la ĉeĥa kulturo.

Fuŝaj estis ankaŭ multaj ekskursoj malgraŭ tio (aŭ eble ĝuste pro tio?), ke ili estis organizitaj en laboro kun la ĉeĥa vojaĝagentejo CEDOK. La celoj por tuttagaj ekskursoj estis tro foraj. Tien la busoj bezonis pli ol du horojn por transporti la partoprenantojn. Restis, do, nur malmulte da tempo por ĝui atrakciojn kaj regionan pejzaĝon. Pri vesperaj ekskursoj mi aŭdis kritikon: foje nek estis organizitaj busoj ek de la kongresejo nek almenaŭ komuna foriro. Ekskurso kun anoncita vizito de fama bierfarejo 'U Fleku' konsistis nur el vesperranĝo, kiun eĉ ĉiu vizitanto mem devis pagi. Laŭ mi estus pli-bona (kaj eĉ malpli-kosta) reklami ĉiu kongresano organizus mem sian vesperan programon!

Nur jes, la kongreso havis mankojn sed eviteblajn kaj malgraŭ tio mi ne volas diri, ke mi ne ĝuis la kongreson. Por la kongresejo estis uzita granda moderna konstruaĵo; kies fenestroj prezentis belegan tranokteblon apud Prago. Multaj belvidaj restoracioj kaj kafejoj invitis por babili kun amikoj. Ĉirkaŭ 3000 kongresanoj trovis sufiĉe da loko por amuzi kaj esti kune. La programo konceme prelegoj, teatraĵoj, muzikaĵoj, kabaredo ktp. interesis min; oni ofte ne sciis, kion elekti. Ne laste ankaŭ la neforgesebla mirinda urbo Prago kontribuis al la bonfarto dum la kongreso.

Jiri Proskovec

(R)

ob:



Proksimiĝas 1997

kaj denove kotizaĵo. Nur per sufiĉaj financoj nia asocio povas daŭrigi aktivecojn favore al la internacia lingvo Esperanta. - LEA/G petas vin, sufiĉe frue ĝiri vian kotizon/abonprezon - 15,- gmk. al Kersting Sonderkonto n° 416210 - 432 Postbank Essen (BLZ 360 100 43) > Legantoj en eksterlandoj bv. sendi ok(8) IRK al A. Stephan, Renschener Str. 47, D-77704 Oberkirch Dankas kaj kora salutas. - via Kasisto Kersting

LINGVA ANĜULO

Norbert Bartelmes, viele Jahre Vorsitzter des Übernationalen Weltbundes - S.A.T., war ein hervorragender Esperanto-Grammatiker. 1949 schrieb er über:

DE, DE POST aŭ DEPOST

"En la lemlilo de Brikisto oni trovas la transskribon >depost< (ne disigita vorto) por traduki la germanan 'seit'. Kelkaj opinias preferinde skribi la vorton dise: >de post<, aŭ eĉ forlasi ĝin tute favore al >de<. Sed necesas rimarkigi, ke >de< jam havas tiom multflankan uzon en Esperanto, ke vere ĝi povas konduki al miskomprenoj en iuj frazoj (precipe kun pasivaj verbformoj). Tiam la unuvortan skribmanieron >depost< pro forŝovo de l'akcento al la unua silabo ŝajnas al mi sence, ĉar ambaŭokaze, ĉu kune, ĉu dise skribite, ambaŭ silaboj (prepozicioj) havas egalan akcenton. Tiu sama fenomeno estiĝas ĉe ĉiuj kunmetitaj vortoj. Neeviteble ĉe "ĝardenpordo" du akcentitaj silaboj kunpuŝiĝas, ĉar oni uzas Esperanton logike (ankaŭ parole)! Estas do nenia motivo por skribi dise la kunmetitan prepozicion >depost<.

Cetera ne estas hazardo, ke ankaŭ en pluraj naciaj lingvoj simila formo ekzistas (france: depuis) kaj la vorto estas skribata maldise. Ĝi estas logika vortformado. Unu el la malmultaj lingvosciencistoj, kiuj serioze okupis sin pri Esperanto, R. de Saussure, kies logika rezonado meritas nian atenton, jam en la j. 1909 pritraktis klare tiun ĉi supran punkton. Ni retrovas nome en la tre severe laŭfundamente redaktita revuo LINGVO INTERNACIA (n° de marto 1909) el la plumo de R. de Saussure jenon:

"En L.I. jan.1909 S-ro Cart skribas kontraŭ la enkonduko de nova prepozicio post la pasivaj verboj. Efektive se oni ĉiam uzus la plej taŭgan prepozicion kaj memorus, ke post pasiva verbo prepozicio >de< niatas la personon, kiu faras la agon, oni neniam ricevus dubesencajn esprimojn. Ekz. "tiu letero estis ricevita >de< mi el S-ro Cart", tiu komercaĵo estis aĉetita >de< mi el komercvojaĝisto", - "la akcepto >de< la Angloj al la Francoj estis ĉama". - Prepozicio >el< tre taŭge montras la devenon: "li venas el Berlino". Nur kiam oni parolas pri tempo, oni devas uzi >de< por montri la devenon: "de la komenco de l'jaro", "de ok tagoj" ktp. Sed tiam povas ekzisti nenia konfuzo kaj plie oni povas uzi kunmetitajn prepoziciojn: "depost la komenco de l'jaro" - "deantaŭ ok tagoj".

Notu la unuvortecon, jam en tiu propono el 1909, de >depost< kaj >deantaŭ<. Ĉe amasiĝo de la prepozicio >de< post pasiva verbo ofte ŝajnas rekomendinda, pro klareco, ankaŭ la uzo de >fare de<".

* Pro elizio de l'unua substantiva -o.

Estas interesa kiel kaj kiam Bartelmes kaj Saussure uzas >l'< anstataŭ >la<. Oni povas lemi de la iamaj fakuloj!

Einige Wortübersetzungen für den Anfänger:
dise - getrennt; forŝovo - Beiseiteschieben; sence - ohne Sinn; neeviteble - unvermeidlich; kunpuŝiĝas - stoßen aneinander; maldise - nicht getrennt; nome - nämlich; rilatas - bezieht sich auf; unuvorteco - Wortzusammensetzung.

Im übrigen empfiehlt sich Benutzung eines Wörterbuches!

AFS

Laborista Esperanto-Movado
en Lepsiko

Ino Kolbe, filino de la eminenta esperantisto Reinhold Voigt, fondinto de GLEA, kolektis materialon kaj verkis broŝuron pri la historio de GLEA. Lastan jaron ŝi finpretigis la duan parton.

La verko estas fakte kompletigo de Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado, kiu eldonis Fritz-Hüser-Institut, Dortmund, kaj LEAG.

Ni rekomendas ambaŭ la verkojn. La prezo de la Kolbe-historio ne estas konata. La Hüser-verko kostas 10,- DM plus ekspedkostoj.

Adresoj: Lepsika historio - Dro. Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str.110, D-12683 Berlin; Hüser-verko - Albert Stephan, Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch.

Esperanto-Bücher-
Dienste

- | | |
|---|--|
| 1. Consuelo FÜHRER
Am Stadtpfad 11
D-65760 Eschborn | 2. Rolif BEAU
Jacobstr.9
D-04105 Leipzig |
|---|--|

Esperanto-kurso en Halle

LEAG-konsilanto Siegfried Linke aranĝis kurson en sia urbo jam flno de 1995. Li varbis dek gejunulojn kiuj komencis lerni Esperanton per Cseh-metodo. Ni esperas, ke li sukcesis kaj povis daŭrigi per kurso por progresantoj.

Apernovoj - Impresioj:

Eldonanto: Herausgeber:

Libere Esperanto-Asociojn Germanie

Freier Esperanto-Bund in Deutschland

Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch (Eschb.)

Resp./Versthw.: Albert F. Stephan (AFT)

Kunlaborantoj: K.-H. Kersting, Essen (KHK)

Marga Stephan, Oberkirch (MST)

Hans Rodewig, Hannover (HR)

>Artikol-aŭtoroj respondecas pri la kontento de artikoloj kaj pri la akcepto de artikoloj.

>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.

>>>>>>>>>>LEAG-membrikoj devas aldoni la sumon de 15,- DM al ĉiuj artikoloj.